


LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO POR LA INFANOJ

T.J.O. CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO, ĜIRO 382363 • JARKOTIZO 1.- NED. GULD. AŬ EGALVALORO

Elfinetoj.

(Originala danckanteto laŭ flandra melodio).

1 = D

$\frac{3}{8}$ 5 | 5 . i | 7 . 6 | 5 . . | 3 . 2 | 2 . 3 | 4 . 5 | 3 . . |

Ni estas el-fin-e-toj El be-la sonĝo, jes,

5 | 5 . i | 7 . 6 | 5 . . | 3 . 2 | 2 5 7 | 7 . 6 | 5 . 0 |

Sur nudaj pied-e-toj Alpaŝas ni ja sen pez'.

$\overline{6.5} 4 | \overline{5.4} 3 | 2 3 4 | 5 . . | 6 7 i | 5 . 1 |$

Goju momenton, in-fa-noj, pro ni, Ĉar ni for-ir-os

$\overline{3.3} 2 | 1 . ||$

baldaŭ de vi.

2. Veninte el arbaro
al homoj en la mond',
kuretas nia aro
nun gaje en hela rond'.
(rekantaĵo).
3. Kaj kiam flirte dancas
ni laŭ la birdokant',
gracie ni balancas
sur rozo kaj heliant'.
(rekantaĵo).
4. Ni sur la luma fono
— brilanta pura or' —
similas al burĝono,
el kiu fariĝas flor'.
(rekantaĵo).
5. Sur la piedaj fingroj
ni iras hejmen nun;
kaj super pinaj pingloj
forflugas ni al la sun'.
(rekantaĵo).

Rogiero.

Faru kvar frazojn ĉe ĉiu bildo. Ekzemple:



1. Sur la bildo estas benko.
2. Sur la benko sidas knabo.
3. Super la benko pendas lampo.
4. La benko staras sur la planko.




1. ...
2. ...
3. ...
4. ...



1. ...
2. ...
3. ...
4. ...



1. ...
2. ...
3. ...
4. ...



1. ...
2. ...
3. ...
4. ...

C

- C estas la citronujo, ĉu vi konas landon, kie ĝi floradas?
 C estas la cedro, kiu sur Libanono verdadas.
 C estas la blua cejano inter la gren'.
 C ja estas la bela ciklamen'.
 C estas ciklono, ventego terure turniĝanta.
 C ankaŭ estas ciklopo, la unuokula hom' giganta.
 C estas citizo, pompega kiel pluvo el or'.
 C eh estas flava cinamo, kun cinama odor'.
 C estas cikonio, nestanta ĉe homa loĝej'.
 C ho estas la cervo en vasta herbej'.
 C estas la cigno, pli blankan birdon ni konas apenaŭ.
 C estas c, nun vi sciu tion almenaŭ.

Rogiero.

Enigmeto.

Estas virina persono; ĝi nombras kvar literojn u. Serĉu sub la c en ĉi tiu numero kaj vi trovos la solvon. Jes... jes... vi pravas, ŝi havas nur unu okulon.

Rogiero.

(La solvon vi trovos en la venonta No.).

Manuskriptoj por la aprilo-majo-no. de LJV estu en la redaktejo antaŭ 1 aprilo.

La solvo de la sorĉa kvadrato (No. 133): 1. akvo; 2. kiel; 3. vere; 4. oleo. — La premion gajnis Adelheid v. Waldowski, Birkenwerder bei Berlin, Germanujo.

Se vi timas.....

Ventegis. Inter la pasaĝeroj, kiuj en la vespero eniris la aeroplanon estis tre maljuna sinjorineto.

„Ĉi tio estas mia unua aervojaĝo!” ŝi konfesis al la aeroplankelnero, kiam ŝi eniris.

Li kompatis ŝin: La unua flugado, kaj en tiom malluma, ventega vespero! Kiam la flugmaŝino ekmovis sin, li malligis la zonon de sia seĝo kaj ekstaris, malgraŭ ĉiuj instrukcioj. Li eksidis sur la brakon de ŝia seĝo kaj prenis ŝiajn malvarmegajn manojn en siajn. Ŝi forte tenis lin.

Kiam ili estis alte en la aero, super la malbona vetero, li liberigis sin, kaj ĝentile kapsalutis ŝin. Ŝi resalutis per la kapo. „Se vi dum la malleviĝo ree timas, kara knabo,” ŝi diris, „tuj revenu al mi, tiam mi ree tenos vian manon!”

Trafa respondo.

Kiam la ĉefepiskopo d’Affre (ĉefepiskopo de Parizo) ankoraŭ estis simpla paroĥestro li iam renkontis ŝercemulon en publika veturilo. La viro volis amuzi la vojaĝantojn per la pastro. Li demandis al li: „Kiu diferenco ekzistas inter azeno kaj episkopo?”

La pastro, surprizita, rigardas al la impertinentulo, kaj respondas post kelkaj minutoj, ke li ne scias tion.

„Nu,” respondas la spritulo: „azeno portas sian krucon sur la dorso kaj episkopo portas ĝin sur la brusto.” Tiam li mem ekridis, kvankam li rikoltis nur malmulte da sukceso.

Post momento pastro d’ Affre diras al li: „Kaj vi, sinjoro, ĉu vi scias la diferencon inter vi mem kaj azeno?”

„Ne.”

„Nu, nek mi scias tion!”

Interparolo (daŭrigo).

Valerio: Ĉu vi ŝatas vojaĝi, Maŭrino?

Maŭrino: Kompreneble. Mi ĉiam sopiris vidi novajn pejzaĝojn,

- fremdajn urbojn, kaj grandajn havenojn.
- V.: Ĉu vi iam estis en Parizo?
- M.: Ne, mi neniam estis en Parizo. Ho, se mi povus iri tien. La „ville lumière” oni ĝin nomas. La lumurbo. Pri ĝi mi ofte revas. Urbo kun grava historio.
- V.: Lenjo Vops iros tien. Mi parolis kun ŝia frato Georgo.
- M.: Kia feliĉulino! Ĉu ŝi ricevis grandan heredaĵon? Oni ja bezonas multe da mono en tia luksa urbo.
- V.: Ne, riĉa ŝi ne estas. Ŝi vojaĝos kun karavano sub gvidado de kelkaj geinstruistoj. Tio malgrandigos la elspezojn. Kaj en Parizo estos helpemaj amikoj, kiuj ĉiel asistos ilin.
- M.: Ĉu Lenjo parolas perfekte la francan lingvon?
- V.: Tute ne. Nur kelkajn vortojn ŝi scias france. Sed ŝi estas esperantistino.
- M.: Ĉu oni devas perfekte paroli Esperanton por partopreni?
- V.: Ne perfekte oni bezonas koni la lingvon internacian, sed estas necese, ke oni bone komprenu ĝin, kaj sufiĉe flue povu paroli. Se vi bone prezentas ion en Esperanto, vi eĉ ricevos premion.
- M.: Kiom alloga! Mi parolos kun Lenjo kaj Georgo. Saluton, Valerio.
- V.: Ĝis baldaŭ.

Onklo Pit (daŭrigota).



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

Versailles 3-10 aŭg. '49.

Ĉar por la britaj partoprenantoj ne eblis vojaĝi je 1 aŭg., ni ree devis ŝanĝi la daton. Atentu do bone: la kunveno okazos nun de 3-10 aŭg.

S-ro Cadoret, la vicurbestro de Versailles, proponis al ni belegan teatrosalonon kun grandega scenejo, por la vesperaj programoj. La salono povas enhavi pli ol 500 personojn. Do vespere ankaŭ la junularo de Versailles povos veni por ĝui la gajan sferon de la Tutmonda Junularo!

Tio por ni estu instigo zorgi pri bona programo! Espereble ĉiu partoprenonto, grupo kaj grupeto helpos en tio! Studu teatraĵetojn, kantu, muziku, dancu, deklamu, ludu! Oni nepre kunportu naciajn vestojn.

Dimanĉon, la 7-an de aŭgusto, ni partoprenos en la feriaj festoj, nomataj „La grandaj Akvoj”. Ĉeestos proksimume 100.000 per-

sonoj. Ni tiam faros gravan propagandon por Esperanto: Sur ŝtupo sur parada placo ni grupe kantos sub la verdaj standardoj.

Grupoj en naciaj vestoj prezentos popoldancojn. (La diversaj grupoj estas urĝe petataj tiucele studi konvenajn dancojn, kiujn oni mem akompanu per kantado aŭ portebblaj muzikiloj). Tiu prezentado okazos unu horon antaŭ la komenco de la Lumfesto, vere fabela festo, kun fontanoj, lumludoj, pireteknikaĵoj, dancoj de artistoj, ktp.

ALIGO: En la aprila No. ni publikigos la unuan liston de partoprenontoj. Por la anoncado oni nepre uzu la aliĝilon je paĝo 282 de la antaŭa numero. Kiu ne plu havas tiun numeron povas peti apartan aliĝilon al TJO-Centro, aŭ al s-ro Bizet. Oni kiom eble plej baldaŭ sendu sian aliĝilon al -sro Bizet, Wierre-au-Bois par Samer, P. d. C., Francujo, poŝtĉekkonto: „Lille 1821.35”.

PETO AL LA FRANCAJ PARTOPRENONTOJ: Vi multe helpas la organizan komitaton, tuj pagante vian kotizon Multaj eksterlandanoj ja ne povas transsendi monon, kaj do pagos nur dum la kunveno. Tamen — la komitato bezonas monon por la organizado. Jen kial ĝi urĝe petas la helpon de la francoj! La poŝtĉekkonto de la Ĉ.P. estas „Lille 182135”. La partoprenkostoj estas: por TJO-anoj ĝis 16-j.: 3500 fr.fr.; por pli aĝaj anoj 4000 fr.fr.; por ne-TJO-anoj 5000 fr

INFORMO POR NEDERLANDANOJ: Ĉiu petu por si mem francan monon ĉe iu granda banko. Sed atentu: oni faru tion **antaŭ** 15 aprilo. La vojaĝmonon oni povos pagi per ned. mono. Kiu deziras vojaĝi per grupa bileto (Amsterdam-Versailles pr. 36.—guld.) kiom eble plej baldaŭ anoncu sin al Th. v. Kempen, Wouwermanstr. 29 rd., Haarlem. — Ni klopodos akiri komunan pasporton, sed kiu deziras tion, nepre anoncu sin antaŭ 1 aprilo.

BONE STUDU ESPERANTON, ĉar dum la kunveno okazos konkurso kun belaj premioj! Verŝajne ĉeestos sperta Cseh-Instruisto.

Kiu havas proponojn aŭ ideojn por la programo skribu pri tio al s-ro Omont, 66 rue Albert Joly, Versailles.

Petante informojn (ĉe kiu ajn adreso) oni ĉiam aldonu respondokuponon, aŭ poŝtmarkon, por la respondo.

Por donacontoj ni ankoraŭfoje ripetas la ĝironumeron de la franca ĉefesperanto: „Lille 1821. 35”, S-ro R. Bizet, Wierre au Bois par Samer.

Eĉ la plej etaj donacoj estos bonvenaj. Nia devizo estu: La plenaĝularo helpu la junularon! Por multaj junuloj la kostoj ja

estas tro altaj; aliaj, ekzemple la germanaj, ne povas akiri francan monon. Geamikoj, HELPU LAŬPOVE!

La unua donaco jam venis de J. S. en H. (Franc.): 230 fr.

Novaĵojn pri la IJK oni povas aŭdi de f-ino Royer, pere de Radio-Parizo (14.21 m), kiu nun en esperanto elsendas de la 20-a h. ĝis la 20-a h. kaj 15 min. (franca tempo).

TJO-RUBRIKO.

(sekr. A. Schouten No. 122, Oosthuizen, Ned.).



La diversajn ĉefperantojn ni petas kiom eble plej multe propagandi la I.J.K. en Versailles, ankaŭ en la nacia gazetaro. Ili klopodu formi vojaĝgrupojn.

Proponoj por la laborkunsido de TJO estu en la sekretario antaŭ 1 julio. El la estraro eksiĝis s-roj v. d. Horst (kasisto) kaj Bant (asesoro). En

Versailles do estu elektataj novaj estraranoj. Kiu scias kandidato(j)n informu la sekretariojn pri tio.

Belgujo: Jam aperis la dua landa TJO-Bulteno en 1949, tre belaspekta! Esperu ni, ke ĝi helpos pligrandigi la sekcion.

Finnlando: Pro troa okupiteco la ĉefperanto devis forlasi sian postenon. Ĝis nun ne estas nova. Finnoj povos pagi sian kotizon al Eldonejo Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki-Kä. De ĉi tie ni elkore dankas s-ron Mehtonon pro lia vere tre akurata laboro en la intereso de nia movado.

Germanujo: S-ro Uhde ne plu funkcias kiel ĉefperanto. Ankaŭ lin ni dankas pro lia laboro. Lian taskon transprenis S-ro Günther Schaedel, Kaulbachstr. 61, München. Kiel peranto en la usona zono li jam montris sian aktivecon, do ni fidis pri lia sukceso en la starigo de forta sekcio!

Hispanujo: La ĉefperanto forlasis sian patrujon. Lin anstataŭos S-ro J. Louis Ballesteros, Argensola-3-2°, Zaragoza. Ni deziras al li forton, ĉar li ja devas labori en malfacilaj cirkonstancoj.

Ricevitaj donacoj (de sept. '48): f-ino S. en N. (Brit.): 2,68 guld.; s-ro S. en A. (Ned.): 1.— guld.; S-ino M. en N. Y. (Usono): 10,66 guld.; s-ro J. A. en A. (Ned.): 1,21 guld.; s-ro S. A. en U. (Brit.). 8.— guld.; f-ino G. en I. (Brit.): 2,70 guld.; s-ro O. N. en N. (Brit.). 1,08 guld.



DENASKA ESPERANTISTARO-RUBRIKO.

Onklino Filis ankoraŭ ne ricevis fotografiaĵon de ĉiuj genevoj. Kaj ŝi tiom volonte kompletigos la albumon! Ĉu vi ĉiuj helpos? (Adr: s-ino Weston, 27 Cecil Rd., London N 10, Britujo).

En la januara bulteno de la gepatra faksekcio en Germana Esperanto-Asocio s-ro Morawetz skribis:

Al niaj eksterlandaj amikoj: Nia sekcio kunigas la gepatrojn, kiuj kun siaj infanoj hejme parolas nian lingvon. Ni scias, ke ekzistas internacia organizado „Denaska Esperantistaro”, kiu en la kadro de TJO laboras. Ni salutas tiun samcelan internacian organizon kaj bedaŭras, ke ni ne povas finance subteni tiun laboron. Tamen ni esperas, ke kutima kunlaboro daŭru, por ke la germanaj denaskaj esperantistoj sin trovu post la falo aŭ mildiĝo de la limaj bariloj inter samaĝaj samcelanoj. Ni volas prepari por niaj infanoj la vojon al la mondo, la vojon en la fratecon de ĉiuj homoj. — Por pli bone interkontakti kun vi kaj pruvi nian kunlaboremmon ni invitas kore la idojn de niaj eksterlandaj amikoj partopreni nian infanan restadon dum la kongreso en Göttingen (je pentekosto). Pri la vojaĝkostoj en Germanujo ni laŭeble helpas, kaj en Göttingen mem la infanoj estu niaj gastoj. Ni esperas, ke ni povu starigi dum tiuj kongresaj tagoj amikecan rondon de niaj infanoj (6-12-j.) kie regos la spirito de nia lingvo. Viaj infanoj povos efike kunhelpi, kaj tial mi kore invitas viajn idojn al Göttingen. Petu informojn al: S-ro Morawetz, (13) München, Engelbertstr. 7.

Novaj anetoj (kun naskiĝdatoj): Rose-Marie Fisher (10-3-'46), R.F.D. Meadville, Usono; Elsa Ockey (8-2-'48) kaj Helena Ockey (2-3-'40), 104 Winnifred Rd, Coulsdon, Surrey, Britujo; Jean Louis Couvert (16/6'46) kaj Bernadette Couvert (30/11 '48), 23 rue de Aujda, Meknes, Maroko; Edith Ronda (25/11 '42), Villa Roger, Meknes-Plaisance, Maroko; Petro Skulrlla, Recklinghausen, Süd 5, Wilhelmstr. N.H. 44, Germanujo; Esperantina kaj Wojciech Rogalinski (ĝemeloj, 31/10 '48), Rodom, Str. Sienkiwicza 9 m. 18, Polujo; Line Silvie Retot (27/5' 46) kaj Sylvain G. Retot (1/2 '49), 18-20 rue de la Butte aux Cailles, Paris, Francujo.



KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Belujo: Dussart Camille, Morialme, Belujo, dez. interŝ. il. poŝtk. kun ĉiuj landoj kaj pm, de la Kolonioj, Luksemburgo, Japanujo, Ĉilio, Jugoslavujo kaj Rusujo.

Bolivio: Letervesperon ni aranĝos komence de aprilo. Via kuraĝiga letero aŭ poŝtk. estos bonveŝa. Esp. Centro de La Paz, Av. 20 de Octubre No. 365, La Paz.

Brazilo: Brazila Junular-Organizo (TJO-sekcio) kune kun la Esp. grupo de Bauru aranĝos prop. ekspozicion, de 25/7—1/8 '49. La ĉefp. petas al ĉiuj samideanoj sendi gazetojn, il. poŝtk., librojn, prospektojn, gvidlibrojn, ktp. Adr. L. Bartholomeu, Caixa Postal N 232, Bauru. — Ĉiu sendinto ricevos memordonacon.

Ĉiu, kiu sendas poŝtmarkojn al Filatela departemento de Brazila Junular-Organizo (TJO-sekcio), Caixa Postal 232, Bauru, Est. de Sao Paulo, ricevos memordonacon de la 3-a regiona filatela ekspozicio, okazonta de 25 julio ĝis 1 aŭg. 1949.

Britujo: Mi dez. kor. kun gesamideanoj en ĉiuj landoj de la mondo. Bryan Ranwell, 3 Buckingham Close, Enfield, Middeldx.

Ok knaboj (12-j.) dez. interŝanĝi il. poŝtkartojn kun simila grupeto. Adr: Esp. Grupeto, West County Sec. Modern Boys'school, Highfield, Rd. Dartford, Kent.

Joyce Taylor, 11 Bask St., Methil, Fife, Skotlando, dez. kor.

Elizabeth E. Smith, 1 Back St., Methil, Fife, Skotlando, dez. kor.

Bulgarujo: Stefan Hr. Kosev, Rilska 4, Burgas, deziras interŝanĝi tute plenajn seriojn de poŝtmarkoj.

Stojan St. Mandaĝiev, str. „Haĝi-Eleska” 29, Asenovgrad, (18-jara) deziras korespondi per bildmarkoj.

Ĉeĥoslovakujo: Kun eksterĉiropaj landoj dez. kor. 19-jara studento Václav Smetana, Ostrava XIV, Strádalů 56.

11-j. knabo deziras korespondi kun geknaboj ĉiulandaj. Václav Chod, Tr. Kl. Gottwalda 15, Karlovy Vary.

Dalibor Vitvar, Soudni 739, Praha XIV, Nusle II, dez. kor.

Por junaj geesperantistoj serĉas gekorespondantojn en la tuta mondo: s-ro Frant. Buhr, Praha — Brevnov 514.

Francujo: 30 Lernantinoj (12-15-j.) dez. kor. kun junaj geamikoj el la tuta mondo. S-ino Thébaud, 174 Av. Dampierre, Valenciennes.

Hispanujo: Kelkaj gelernantoj (18-24-j.) dez. kor. kun gejunuloj en la tuta mondo. Skribu al la kursgvidanto J. Luis Ballesteros, Argensola-3-2°, Zaragoza.

Hungarujo: 6 kursoj en Miskolc aranĝos komunan letervesperon en la fino de marto. Ni ŝatus korespondi kun la tuta mondo. Ĉiujn esperantaĵojn, instigajn salutkartojn ni rekompencos. Joh. Blach, Miskolc, Varos-Ház tér 12.

Josefo Bangha-Varga atentigas, ke lia adreso ŝanĝiĝis: Bartok Bela str. 50, Budapest. Li dez. kor. pri maŝinĝenieraj problemoj.

Japanujo: 21-j. ĥemia studento kaj filatelisto (Akira Matukuma, 69 Katahira-mati, Sendai) dez. kor. k. nederl. ĥemiaj studentoj kaj interŝ. poŝtmarkojn kun nederl. filatelistoj.

24-j. studento en la Kyūsyū Universitato dez. kor. kun junaj nederlandanoj pri div. temoj. Kusumoto-Hazime, Hukuoka-si, Kama-Imagawabasi — Dōri, No. 16.

Nederlando: Atentu! La Junularo Amuzklubo „Ekstazo” aranĝos post nelonge Bildkartkunvenon. Eksterlandanoj bonvolu sendi il. poŝtk. Ĉiuj sendintoj ricevos plaĉan surprizon. „Ekstazo, Lombokstr. 2, Leeuwarden.

Mi serĉas korespondant(in)on en Francujo, en Loiret, kie loĝas mia fratino, por renkonti kaj kor. F-ino C. v. d. Oord, V 215, Venhuizen (NH).

Victor Bodarts, 24-j. oficisto, dez. kor. kun junulino en Belgujo. Adr: Jac. v. d. Doesstr. 30, den Haag.

Polujo: Junularsekcio ĉe Vroclava Esp.-Asocio, aranĝos grandan Esp. ekspozicion en Wroclaw. Pro manko je materialo ni petas al la tutmonda esperantistaro sendi al ni librojn, gazetojn, kaj ĉiajn esperantaĵojn. Adr: J. Mielcarek, Wroclaw 1, str. Niemcewicza 5/15.

Helpu Esperantan Junularmovadon. Ĉiuj sendinto nepre ricevos memoraĵon.

LETERVESPERON aranĝos la junular-sekcio ĉe Vroclava Esp. Asocio, je 25 majo. Sendu korespondaĵojn al J. Mielcarek, Wroclaw 1, Niemcewicza 5/15. Ni certe respondos ĉiujn.